La sumo de la tuta ŝoveladenergio, kiu estas necesa por neĝliberigi la enirejon antaŭ la dompordo aŭ la aŭtomobilgaraĝo, ĉiam estas egala. Nur en la sekva okazo la "malseka" neĝo efektive estas pli peza ol la seka: nome kiam „nove falinta" neĝo estas ensorbinta la degelan akvon de la "malnova" neĝo. Tio signifas por la neĝŝovelisto duoblan fortostreĉon... (2001-02-27)

Duba rekordo

La plej granda ruboforigejo de la mondo troviĝas en « *Fresh Kills* » sur *Staten Island*, urboparto de Novjorko sur insulo antaŭ *Manhattan*. Ekde 1948 ĝi akceptas novjorkan rubon, kaj jam en la jaro 1950 oni konsideris fermi ĝin favore al unu el la aliaj 90 oficialaj rubaĵ-lokoj kaj forbrulig-maŝinaroj de la urbego.

Intertempe ĉiuj 90 instalaĵoj estas fermitaj – sed *Fresh Kills* daŭrigas sian laboron. La 13000 tunoj da rubo, kiujn la novjorkanoj ĉiun tagon produktas, estas transportataj al 100 ŝarĝ-kajoj kaj poste portataj per gigantaj pramŝipoj al *Staten Island.* La tiea rubejo kreskas jare per 3,5 milionoj da tunoj – maso, kiu estas proksimume la 76-obla maso de la luksŝipego "*Titanic*". Kelkaj lokoj de *Fresh Kills* jam superas la alton de la Usona Liberecstatuo. Ŝtata permeso neniam ekzistis – sed la ruborenversaĵo fakte en tiu ĉi jaro (almenaŭ oni tiel diras) eble estos fermota... (2001-03-11/12)

Pli estas malpli...

Kio igas abelidon fariĝi reĝino? Ĉio estas afero de la nutraĵo. Kiam la larvoj estas nutrataj per poleno kaj nektaro, ili disvolviĝos al "abelaj laboristinoj". Se ili rajtas manĝi "reĝan ĝeleon" (nome la antaŭfermentitan abelreĝinan nutrosukon) ili poste fariĝos reĝinoj. Kiel oni nun estas malkovrinta, ekzistas sep genoj kiuj estas aktivigataj tutdiverse ĉe laboristinoj unuflanke kaj ĉe reĝino aliaflanke. Pro la malsama nutraĵo tiuj genoj estas en- aŭ elŝaltitaj.

Mirige, ke fakte la nefekundaj laboristinaj abeloj posedas **pli da enŝaltitaj genoj** ol la abelreĝino: estas ĝuste tiaj genoj, kiuj stampas ilin laborbestetoj. Kaj ne kondamnas ilin al la diboĉa vivo de reĝino kun giganta virharemo kaj ovodeponado. Anstataŭe, ili rajtas esplori la belegan, buntfloran mondon – kaj aldone ricevas ŝikan polenan kalsoneton... (2001-03-24/25)

(Fonto : Ĉiuj sciindaĵoj estas el *Brockhaus*-enciklopedia kalendaro « Kio ne troviĝas tiel en la leksikono ». Post la unuopaj teksteroj - enkrampe - la dato de la koncerna kalendarfolio)

Scienca Revuo Vol. 53 (2002)(3) / n-ro 190
Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (SAE)

Pres-indikaĵoj
ISSN 0048-9557, Eldonanto: ISAE
Laserkopiita: Aŭgusto 2002
Responsa redakta teamo
La estraro de ISAE

Responsa redaktanto por tiu ĉi kajero
R. Sachs (DE) – sa
Kunredaktanto
J. Kavka (CZ) – ka
Lingvaj kontrolantoj
O. Haszpra (HU) – ha, S. Schweiger (GE) – sc, J. Wozniczka (PL) – wo, N. Korĵenevskaja (FR) -ko

Eldonkvanto : 200
Adreslisto laŭ kotizoj ricevitaj antaŭ ekspedo
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la koncernaj aŭtoroj. Ili ankaŭ respondecas pri formo kaj formato, se ili mem kompostis.

Redaktaj rimarkoj pri la artikoloj

1. Laŭdado	komp sa	red sa/ka
2. *Haszpra*	komp sa	red ha
3. *Stampa*	komp sa	red sa
4. *Kavka*	komp sa	red ka
5. *Lewin*	komp sa	red sa/sc
6. *Werner*	komp sa	red sa/wo
7. *Ubijko*	komp sa	red ko
8. Scienca eĥo	komp sa	red sa/ka

komp = kompostis; red = kontrolis kaj redaktis

Membrokotizo de ISAE : € 20.00/jare
prefere al
Poŝtbanka konto n-ro 140 380-608 nome de ISAE-Sachs
ĉe Postbank Frankfurt/Main, Germanio, Banka kodo 500 100 60
aŭ al
ISAE-konto ĉe UEA/Rotterdam (NL) : isae-z

Nepre informu pri via pago (kaj kompleta adreso) la eldonanton:
Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio
Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <IsaeSachs@aol.com>